


Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La 47a Zamenhof-Festo en Kawasaki

Sibayama Zyun'iti



En la 17a de decembro (dimanĉo), okazis la 47a Zamenhof-Festo de la Esperanto-Ligo de Kanagawa kun 62 personoj, en la Kawasaki Internacia Centro en Urbo Kawasaki. Ĉi-jara Festo omaĝis al la centa datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof en 1917. Post la Festo, 31 personoj ĉeestis bankedon en la sama konstruaĵo. La Festo estas por 4 grupoj en Gubernio Kanagawa, nome Kawasaki, Jokohamo, Fujisawa kaj Odawara. Sed ĉi-jaran feston karakterizis relative multaj alilandanoj loĝantaj aŭ vojaĝantaj en aŭ ĉirkaŭ Tokio, kiuj konis tiun ĉi eventon pere de Amikumu, aplikaĵo por interkoni ĉirkaŭ-ĉeestantajn esperantistojn.

La Festo komenciĝis je 13:30, per la prezido de la paro Kawabata Fanjo kaj Yuto, paro de svedino kaj japano loĝantaj en Kawasaki, kaj iris laŭ ĉi-suba skemo.

1. serio da prelegoj

1.1 Itabaŝi Micuko (el Jokohamo) prelegis japane pri “la libro, kiun mi tradukis”, nome

pri “La nanoj en domo kun granda zerkovo”, infanliteraturaĵo de Inui Tomiko.

1.2 Fafah (studentino el Madagaskaro, studanta en Mito) prelegis Esperante pri “Madagaskaro”, nome, lando kaj naturo de la malmulte konata insulo oriente de Afriko, kun kultura influo de la Hinda Oceano, nome sud-aziaj landoj, kaj pri kulturo kaj eduko.

1.3 Kawabata Fanjo (svedino) prelegis Esperante pri “Inventaĵoj el Svedio”. Oni miris, ke kelkaj el la konataj aĵoj ĉirkaŭ ni devenas de sveda invento.

1.4 demandoj kaj respondoj pri la prelegoj. Precipe demandita estis lingva situacio en Madagaskaro: en elementa lernejo oni eklernas lecionojn per la ĉiutaga lingvo malagasa, sed



de maldekstre: Itabaŝi Micuko, Kawabata Fanjo, Fafah

alta eduko okazas nur per la franca lingvo.

2. prezento de la partoprenantoj, kongresoj ktp.

2.1 personoj: Laŭ rondoj, kaj de venintoj ekster Kanagawa, ekster Japanio.

2.2 klarigo pri surpapera prezento de libroj, rekomendataj de Kanagawa-anoj.

2.3 pri la 2-a Komuna Kongreso Japana-Esperanta en 2018, en kiu kadro estos la 105-a Japana Esperanto-Kongreso. Suzuki Keiichiro prezentis.

(duonhora paŭzo de 15:00, kun kukoj, dum kiu oni povis aĉeti librojn)

3. Junuloj raportas pri la kongresoj

3.1 Phuong Midori, vjetnamino loĝanta en Japanio raportis pri la Universala Kongreso en Seulo, Koreio. Kvankam ŝi laboris kiel LKK-ano en la vjetnama UK, ŝi unuafoje povis ĝui UK ĉi-jare.

3.2 S-ro S en Tokio raportis pri la SAT-kongreso en la proksimo de Seulo, Koreio. Li unue skizis kio

estas SAT, kaj parolis pri la kongreso mem.

3.3 demandoj kaj respondoj.

4. Video-prezentado pri Esperanto-agadoj

Malmultfoje, sed certe Esperanto-agadoj estis prezentitaj en televidaj programeroj. Tiamaj elsendoj video-igitaj estis prezentitaj. Temas pri la Japana E-Kongreso en 1987, aranĝoj en Kanagawa en 1994 ktp. Pro tempomanko, ne ĉiuj materialoj povis esti vidigitaj.

5. Fermo: nome de Jokohamo, Sibayama Zyun'iti salute deklaris, ke en 2018, Zamenhof-Festo okazos en Jokohamo.

6. Komuna fotado.

(reviziita versio)



Niaj Planoj

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

*jan. 28 [KK] la 4-a Ĝenerala Kunsido de la NPO, kun resumo de la jaro 2017, plano pri la jaro 2018, kaj revizio de la statuto.

*feb. 4 [ĉambro en la domo de JICA] Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havos prelegon pri Esperanto.

*feb. 17 [KK] Hama-Ronda Vespero: Hamalologio (1)

*mar. 3 [KK] Legokunsido: "La viro el la pasinteco" de Julian Modest estos legita.

*mar. 10-11 [KK] Foiro de Civitana Agado. Grupoj uzantaj KK-n por sia agado kunvenas kaj ekspozicias pri siaj agadoj.

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

*Regulaj Klasoj en sabato:

(1) Klaso "Eseoj" por legi "Tamen ĝi moviĝas!" gvidate de Doi Hirokaz

(2) "Jokohama Salono": 2 fojojn monate oni legas "Mondo de travivaĵoj", 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado laŭ sia plaĉa fonto

(3) Rudimenta Kurso, de la 13a de januaro, gvidate de Fuse Kentaro

*Regulaj Klasoj en merkredo:

(1) Klaso "Belĉielo", por legi "Punkuino", gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso "Belflora", por legi "Punkuino", gvidate de Doi Ĉieko, du fojojn monate; datoj nefiksitaj

(3) Klaso "eriko", por legi "La Zamenhof-Strato" gvidate de Doi Ĉieko

La 109a Legokunsido

En la 2a de decembro, ni havis la 109an legokunsidon. Legita estis “**Simile al stelo en nokta Ĉielo**”, bildolibro pri juna Zamenhof, kun bildo de Akira Saŭa, japano, kaj esperantlingva teksto de Charles Rowe, tradukita de la japanlingva originalo de Akira Saŭa.

Zigzage ĝis la Unua Libro

--- Simile al Stelo en Nokta Ĉielo: Vivo de Zamenhof ---

Sibayama Zyun’iti

Tiu ĉi libro estas bildrakonto 96-paĝa, pri la Vivo de Zamenhof, de la naskiĝo en 1859, ĝis la publikigo de La Unua Libro de Esperanto en 1887, kun parolbalono Esperanta, sed kun japanlingva ekvivalento en la suba parto de la sama paĝo. Fakte, la rakonto estis originalaĵo kun la bildoj, de Akira Saŭa, japana virino. Tion tradukis Esperanten Charles Rowe, angla esperantisto loĝinta en Oomoto-Centro en Japanio.

Tial japanoj sentos, kiel bonege (ĝenerale) aŭ bonete japanlingvaj paroloj estas esperantigitaj. Ekzemple, en p.24, juna Zamenhof sola iras vagonare al Moskvo kaj la familianoj adiaŭas lin, kaj ili ambaŭflanke aldiras unu-maniere “Ĝis revido” --- plej verŝajne estis tiel ---, sed laŭ la japanlingva originalo, la familianoj diras *Itte rassjaj!*, dum juna Zamenhof diras *Itte majrimas!*, do du-maniere, konforme al la japana kutimo.

Nu, kvankam la librotitolo montras “Vivo”-n, la libro temas nur ĝis la publikigo de Esperanto. Pro tiu karaktero, la knaba kaj junula sento, sentimento, ĝojo kaj malĝojo estas detale priskribitaj kompare al la jam publikigitaj biografioj. Ekzemple, epizodo pri Sanjo, nome fratino Sara forpasinta tro juna, okupas gravan parton. En iuj biografioj, oni skribas simple ke “fratino Sara frue mortis”, en alia (de Edmond Privat), la afero ke Zamenhofon insultis nejudoj per alnomo je “hundo”, sed en tiu ĉi verko, la afero estas ligita kun la kuna ĉeesto de la juna Zamenhof kaj Sara (en p.6). De kie tamen la aŭtoro ĉerpis tiun epizodon? Pri tio, Iwaya Micuru, la kunordiginto de la Legokunsido donis sugeston --- La biografia romano japanlingva nomata “Zamenhof” de Ito

Kanzi estis la fonto. Ito Kanzi estas internacie konata per la plumnomo ludovikito, por la plena verkaro de Zamenhof. Li, antaŭ ol tiu verkaro, verkis ja romanon pri Zamenhof, kaj en tiu volumo unua aperas tiu afero de Sara kaj judo persekutita kvazaŭ hundo. La postaj epizodoj pri la proksimiĝo al cionisma movado estas ankaŭ laŭ tiu fonto, mi pensas. Tiel, la “Vivo” ne nur priskribas lian lingvan geniecon, sed ankaŭ zigzagan vojon ĝis la publikigo de la Lingvo Internacia, kiu poste populariĝis kiel la lingvo Esperanto.

Alia noto: en tiu libro, la juna iniciatonto de Esperanto estas nomata Ludoviko aŭ Luĉjo. Tio sekvas la tradicion de biografioj de Privat, Boulton, kaj kompreneble de ludovikito, Ito Kanzi. Sed lastatempaj biografioj, kiel tiu de Kobajaŝi Cukasa k.a. nomas lin Lazaro, ĉar oni hodiaŭ scias, ke “Ludoviko” estas alnomo aldonita post plenkreskiĝo, post la publikigo de Esperanto.



Eseo

Koncerto de virina korusgrupo “Graceful Singers”

MURATA Kazuyo

Amatoraj korusgrupoj troviĝas pli ol 200 en nia urbo Jokohamo, krom lernejaj grupoj. La aĝo de membroj estas de 10 ĝis 100, kompreneble ekzistas viraj, virinaj kaj miksvocaj korusoj. Tial okazas multaj koncertoj en ĉiu jaro. La koncepto de nia grupo “Graceful Singers” estas ĝojigi la aŭskultantojn, kiuj bonvolas veni pagante kotizon.

Nia grupo havas koncerton en ĉiu dua jaro. En la 24a de novembro 2017, de 18:30 ĝis la 20:30, ni havis la 10an koncerton en la malgranda halo de MinatoMirai. Niaj membroj estas mez- kaj altjaraĝaj, kaj ni esperis okazigi tage, sed gajni en loto por lui halon estas tre malfacile. Pro tio ĉi-foje ni devis havi koncerton en vintra vespero, kaj spektantoj estis malmultaj kompare kun la antaŭaj fojoj.

Antaŭ du jaroj la nombro de niaj grupanoj estis 28, sed pli kaj pli malmultiĝis, kaj ĉi-foje estis 20. Krome ĝis la antaŭa tago kelkaj personoj ne povis kanti pro malvarmumo, aŭ kelkaj malsaniĝis, kaj ni estis maltrankvilaj. Sed danke al bela kaj varma vetero, nia prezentado apenaŭ sukcesis.

En la unua sceno ni unuafoje kantis sen piana akompano (nomata *a cappella*). Tio postulas altan teknikon je harmonio. En la dua sceno ni kantis suiton kun 4 melodioj, komponitaj el 34 tankaŭoj de junulo. Verdire mi ne povis bone kompreni la

sencon... En la tria sceno ni prezentis kantojn, kiuj furoris antaŭ pli ol 40 jaroj. Plenaĝuloj preskaŭ ĉiuj sciis la kantojn, kaj do ili ĝuis aŭskulti la karmemorajn kantojn.

Ni devis parkerigi 20 kantojn kaj kelkaj kantoj estis kun dancomovoj, tial la hurdo estis alta por ni. Mia kokso havas problemon, pro kio starado estis severa. Antaŭ du jaroj kiam finiĝis la koncerto, mi pensis, ke estus bone ĉesigi la koruson. Sed se mi ĉesigus ĝin, mia bona kutimo por saniĝo haltus. Pensante tiel mi daŭrigis kantadon.

Origine antaŭ 9 jaroj, kiam komenciĝis mia malsano ĉe vertebraro, mi intencis kantadon por resaniĝi. Feliĉe mi povis prokrasti operacion por 8 jaroj. Lastjare mi ne povis toleri la doloron, kaj decidis ricevi operacion. Kuracisto enŝovis 6 boltojn en la vertebrojn por fiksi ilin. Tio sukcesis kaj mi liberiĝis de doloro, sed ankoraŭ restas paralizo ĉe piedo kaj iskiatalgio. Pro tio mi estas malforta je piedirado kaj longa starado.

Mi havis timon, ke mi falos sur podio. Oni metis seĝon malantaŭ mia pozicio por ke mi povu sidiĝi iam ajn. Danke al tio mi povis trankvile kanti ĝis la fino. Tre ĝoja afero estis, ke 4 familianoj venis por aŭskulti mian lastan koncerton. Bofilino bonvolis veni, eĉ petante de siaj gepatroj prizorgi ŝian infaneton. Tiam estis mia plej feliĉa tago en mia vivo!!

